

2) Mi invitas la kanzonistojn verki strofojn, kiuj proponus instruon de la alfabeto: tiaj ekzistas en ĉiu nacia lingvo.

3) Mi invitas teknikistojn praktike apliki la novajn liternomojn en siaj prelegoj kaj eventuale indiki la prononcon de la formuloj en piednotoj. Laŭ eblo ili raportu pri siaj spertoj al la aŭtoro (D-ro A. ALBAULT, 32 Av. Et. Billières, 31-TOULOUSE-03, Francio), kiu post prudenta tempopaso publikigos la rezultojn kaj eventuale ankoraŭ pli poste faros paŝojn por oficialigo.

Ni fine notu la ekziston de akcesora problemo, jam parte solvita sed kiu estus facile finsolvita post definitiva solvo de la alfabeto problemo: mi aludas la nomigon de la supersignoj en la diversaj lingvoj kaj en Esperanto.

BIBLIOGRAFIO

- A. ALBAULT. Nomo de kelkaj supersignoj. Heroldo, 1 MAR 61, p. 3.
- A. ALBAULT. Alvoko pri alfabeto eksperimentado. Dokumentaro de la Unua Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, Kopenhago 1962 (p. 26). (Sciencra Revuo, Vol. 13)
- A. ALBAULT. Skribo kaj prononco. Monda Kulturo, Vintro 64—65, p. 28.
- A. ALBAULT. Provo de transskribo de du ŝemidaj lingvoj (hebrea kaj araba) kaj de la greka lingvo. Biblia Rev., n^o5, p. 25—35. (ankaŭ en aparta depresaĵo).
- F. J. BELINFANTE. Enketo pri prononcado de formuloj. Sci. Rev., Vol. 1, p. 106—107.
- F. J. BELINFANTE. Rezulto de enketo pri prononcado kaj skribmaniero de literoj kaj nombroj en formuloj. Sci. Rev., Vol. 3, p. 60—66.
- J. GILTAY. Formuloj en Esperantaj revuoj. Sci. Rev., Vol. 1, p. 23—24.
- K. KALOCSAY, G. WARINGHIEN. La alfabeto. En: Plena Gramatiko, 3-a eld., Kajero 1 (Vd. § 2 sur p. 23—24).
- KONISI Gaku. Pri la liternomoj en E-o. Kajero, APR 66, p. 15 (eld. en Osaka).
- W. LIPPMANN. La nomoj de la nesesperantaj literoj kaj signoj. Oficiala Bult. de la E-ista Ak., Kajero III, Junio 1930, p. 40—46.
- W. J. NIJVELD. La elparolo de literoj en Esperanto. Dokumentaro de la Unua Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, Kopenhago 1962 (p. 27—28). (Sciencra Revuo, Vol. 13)
- W. P. ROELOFS. La fonetika eksperimento de Radio Roma. Sci. Rev., Vol. 4, p. 135—147.
- W. P. ROELOFS. (en recenzo pri »Lingvo kaj Vivo« de Waringhien). Sci. Rev., Vol. 12 p. 58.
- V. SADLER. Effect of succeeding vowel on consonant recognition in noise. Language and speech, Vol. 4, Part 2, APR—JUN 61, p. 133—138 (ankaŭ en aparta depresaĵo).
- G. WARINGHIEN. Pri la nomoj de Esperantaj literoj. Lingvo kaj vivo, Stafeto 1959 (Vd. p. 239—243).

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Sciencra Asocio Esperantista, Vol. 17, n-ro 2 (1966)

930.22(093)'091

TEKSTKRITIKO

Kun propono de Esperantaj terminoj


(Ebbe Vilborg, Göteborg, Svedujo)

1. Ni ne posedas propramanajn manuskriptojn (**aŭtografojn**) de la klasikaj aŭtoroj grekaj kaj latinaj, nur kopiojn (en formo de **kodeksoj**, L codices, aŭ papirusaj fragmentoj), derivitajn de la originalo per nekonata nombro da perantoj. La tuta procedo de transdonado de tia teksto ĝis la plej nova konservata kopio estas nomata **teksttradicio** (L traditio). La tasko de la tekstkritiko estas produkti tekston kiel eble plej proksiman al tiu de la originalo. Oni povas distingi du fazojn en tiu laboro: (1) La determino de la tradicio estas nomata **recenz(ad)o** (L recensio). (2) La posta prilaboro de la recenzita teksto estas nomata **emend(ad)o** (L emendatio).

2. La teksttradicio manifestiĝas aŭ en unu sola manuskripto (**unika kodekso**, L codex unicus) aŭ en pluraj. Se ekzistas pluraj, ĉiu el ili dependas aŭ de konservata aŭ de perdita modelo. Estas klare,

ke kopio dependanta de alia ekzistanta kopio estas senvalora kiel atestanto pri la originala teksto. Tiaj kodeksoj devas esti eliminataj (**eliminado de kodeksoj**, L eliminatio codicum). Se post la eliminado ankoraŭ restas pluraj kodeksoj, tio signifas ke la teksttradicio estas fendita. La disiĝo ekestis tiamaniere ke pluraj kopioj estis farataj de la sama modelo. La modelon perditan, ĉe kiu la disiĝo komenciĝis, ni nomas **arĥetipo** (L archetypus). Se ĉiu konservata kopio dependas de nur unu modelo, la dependrilato inter la ekzistantaj kopioj kutime estas pruvebla*) (Se, male, iu kopio estas farita laŭ pluraj modeloj samtempe, la tradicio estas **kontaminita** kaj la interligiteco de la kodeksoj malfacile montrebla.) — Oni povas rekonstrui la tekston de la arĥetipo kun certeco, se la tradicio estas almenaŭ tribranĉa; se ĝi havas nur du branĉojn, oni multloke devas konstati du **variantojn** (L variae lectiones), el kiuj unu probable erestis en la arĥetipo. La tradicio povas tamen esti pli fendita, tiel ke ankaŭ la ĉefbranĉoj disiĝis. La modelo, ĉe kiu komenciĝis tia disiĝo, estas nomata **subarĥetipo** (L hyparchetypus, subarchetypus).

3. La dependrilatoj inter la diversaj atestantoj de la tradicio povas esti resumataj per diagramo, t. n. **stemato** (L stemma/codicum/; oni parolas ankaŭ pri **stematiko**, t. e. la teĥniko fari stematon). En stematoj la konservataj kodeksoj estas signataj per latinaj literoj, la perditaj modeloj per grekaj. Ekzemplo de stemato:



*) pere de la **distingigaj eraroj** (L errores significativi), kiujn ĉiu kopiisto neevitable faris.

La recenzado kondukas do ĝenerale aŭ al konservata unika kodekso aŭ al rekonstruebla arĥetipo.

4. Post la recenzado komenciĝas la **ekzamenado** de teksto (L examinatio) por esplori, ĉu la teksto en la fiksita tradicia formo estas akceptebla, t. e. probable konforma al tiu de la originalo. La recenzita teksto povas enhavi diversspecajn erarojn: (A) Ĝi povas esti necerta pro la ekzisto de du variantoj, el kiuj neniu estas certe atribuebla al la arĥetipo; (B) Ĝia vorteco povas esti neprobabla pro lingvaj aŭ faktaj kialoj; (C) Ĝi povas esti makulita per ellasoj (**lakunoj**, L lacunae).

(A) Se la tradicio estas necerta, oni devas determini la definitivan tekston per **selektado** (L selectio). Ofte oni aplikas la metodon de »la pli malfacila lego« (L lectio difficilior), t. e. oni selektas la malpli facilan varianton. Tekstŝanĝo de strangaĵo al trivialaĵo fare de kopiisto nome estas pli ordinara ol la kontraŭo.

(B) Se la tradicio estas neprobabla (**koruptita**, L corruptus), oni devas provi ĝin sanigi per **emendado** (L emendatio). Normale oni provas per **konjektaĵoj** (L coniecturae) korekti la tekston; se tio ne eblas, oni devas kontentiĝi per konstato de la koruptaĵo, almetante **krucojn** (L cruces) al la koncerna tekstloko.

Se konjektaĵo en tre trafa kaj preskaŭ nerefutebla maniero sanigas la tekston, oni nomas ĝin **evidenta**.

(C) Se oni **konstatas lakunon** (L statuere lacunam), oni devas se eble ekzakte determini la probablajn limojn de la ellaso. Malgrandajn kelkvortajn lakunojn oni povas ĝenerale **plenigi** (L supplere); rilate pli grandajn, oni ofte estas devigata kontentiĝi per supozo pri la probabla enhavo de la perditaj teksto.

La tekstekzamenado estas fina fazo de la **tekstestablado** (L constitutio textus). Ĝi kondukas krome al taksado de diversaj atestantoj, kiu povas esti pli malpli fidindaj.

Noto: En la malnova tekstkritiko oni ofte distingis »**freŝdatajn kodeksojn**« (codices recentiores) disde »**antikvaj kodeksoj**« (L codices antiquiores), principe preferante la lastnomitajn. Tamen pli nova tekstatestanto ne estas malpli bona nur pro sia noveco.

5. La laboro de la **teksteditoro** (L editor) devas en la preta **eldono** (L editio) esti resumata per **kritika aparato** (L apparatus criticus), kiu — sub la akceptita teksto — listigas ĉiujn legojn de la neeliminitaj kodeksoj kaj krome ĉiujn gravajn konjektaĵojn. La indikoj de tiu aparato estas laŭkutime skribataj latine (ofte per mallongigoj); se iu volus ĝin verki en Esperanto, li povus uzi jenajn esprimojn:

Lat.	Esp.	t. e.
add.	ald.	aldonis
bis	rip.	ripetis
codd.	kod.	la kodeksoj
coni.	konj.	konjektis
cett.	cet.	la ceteraj
corr.	kor.	korektis
cruces apposui	krucojn almetis mi	
del.	nul.	nuligis
des.	ĉes.	ĉesas
edd.	eld.	la eldonoj
fortasse	eble	
inc.	kom.	komenciĝas
in marg.	en marĝ.	en la marĝeno
	marĝ.	marĝene
in ras.	sur skr.	sur skrapaĵo
mss.	ms.	la manuskriptoĵ
malim	préf.	preferinde (mi preferus)
om.	ell.	ellasis
pro	anst.	anstataŭ
scripsi	mi	mi skribis
suprascr.	superskr.	superskribita
transp.	trm.	transmetis

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 17, n-ro 2 (1966)

523.1:523.4

PRI FORMIĜO DE LA PLANEDOJ DE SUNO

— nova hipotezo —

(Akad. V. Vilcovici, Bukaresto, Rumanio)

Bonè konata estas la hipotezo laŭ kiu la sunaj planedoj naskiĝis el korpo de la Suno, nome el gutegoj disĵetitaj de la Suno ĉirkaŭ si pro la centrifuga forto kreita de sia rotaciado ĉirkaŭ la propra akso. En astronomio ĉi tiu hipotezo estas konata kiel teorio de Kant-Laplace.

Ekzistas ankaŭ hipotezo — malpli probabla — laŭ kiu elĵetitaj gutegoj de la Suno estus devenitaj de ia renkontiĝo inter ĝi kaj alia ĝiela korpo havinte similan grandecon. Tiu teorio estas nomita katastrofa teorio pri formiĝo de la planedoj.

Astronomia matematiko, esplorinte moviĝadon de masoj rompitaĵoj el la Suno, ĉu laŭ la unua, ĉu laŭ la dua hipotezo, sukcesis antaŭ nelonge, pere de laboro de iuj sovetaĵ astronomoj, demonstri ke la totala maso de tiuj ĉi gutegoj, kaŭze de reciprokaj interagoj dum tempopasado, alprenis formon de unu diskorondo ĉirkaŭ la Suno, lokita en ĝia ekvatoro kaj cirkle moviĝinte ĉirkaŭ centro de la Suno.

Radio de tiu elastodisko rondforma, tiom granda kiom la distanco de centro de la Suno ĝis la planedo Pluton.

Ĝis la lasta tempo oni diris ke la planedoj formiĝis el tiu-ĉi materio pere de iuj reciprokaj interagoj, precipe gravitecaj, inter materiaj korpuskloj.